ISSN 0018-0823

# HEROLDO de esperanto

SPECIALA UNIKA NUMERO LUITA DE LA ESPERANTA CIVITO

Numero 9 (2359), 100ª jarkolekto — Esperanto-Domo, Postiers 27, CP 311, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando) - telefono (41)32 9267407 - kce@esperantio.net - IBAN: CH63 09000000230029218 — oktobro 2024

## Por Civito laika, progresema, ekologia



de Zamenhof ĝis la Esperanta Civito

La kvina mandato de nia Senato travivis la pandemion kaj militon en Eŭropo. Paralele manifestiĝis la organizaj progreso de la Esperanta Civito kaj regreso de la internaciaj E-istaj NROj, unuavice UEA: jarlibro ĉesinta, biblioteko fordonita, libroservo likvidata, UK pli kaj pli malgranda, eldona agado haltinta. Finiĝis epoko, ekis tute alia: raŭmismo pravas, la raŭmistoj kvazaŭ profetis.

Pro la malsaniĝo de la Konsulo (Riichi Karibe) kaj la retiriĝo de la Vickonsulo (Julio Herrero) ni spertis ankoraŭ internan anstataŭon. Sed **ĉiuj instancoj bone funkciis,** aldoniĝis la **Kongresa buroo** kaj la **Civila Esperanta Servo iĝis aŭtonoma establo.** Necesas plifortigi la Registran Instancon.

La **civitanaro kreskis kvante, sed precipe kvalite**, danke al pli forta stabo, trejnita kaj en Eŭropo kaj en Afriko. Necesis **normigi la administradon kaj konduton de la stabanoj**: tial la Senato aprobis la koncernan leĝon (Lex Adiutoria).

Novaj normoj estis enkondukitaj pri **bibliotekoj kaj arkivoj** (direktivo Giordano, ekse Rogora): ĉapitro ege aktuala, same kiel la **sekureco dum kongresoj** (direktivo Eriksson-Giordano).

La Verda Listo ne insistas pri klasbatalo, sed subtenas la fronton kiu aktivas por **civilaj rajtoj**. Tial ni atentas pri la proponoj el la ekologiismaj, socialdemokrataj, sekularigaj, pacifismaj, mondialismaj subjektoj. Subtene al Esperanta Naturamikaro ni loze referencas al la konsorcio *Green10*.

La finiĝanta mandato spertis la **valorigon de Afrika E-Instituto** kaj daŭrigis la organizadon de esperantologiaj staĝoj. Kreiĝis en Bujumburo kerno de stabo, kiu gvidos la **unuan Esperantan Konferencon en Afriko,** fine de 2025. Tre bedaŭrinde forpasis emerita konsulino, Marie-France Conde Rey, kiu plurfoje aktivis en Afriko, kaj baldaŭ retiriĝos alia emerita konsulo, Giorgio Silfer – la nova Kapitulo devos levi la ganton de grava defio: **daŭrigi la investadon en la Tria Mondo**.

Ĉi-rilate la Verda Listo ne akceptas politikon de almozado, kiu retenus en novkoloniismo la afrikan Esperantion, kaj rifuzas kvazaŭ dungi afrikanojn por partopreni en turisma kongreso, kio analogas al koruptado. **La Civito devas investi en la homoj, ne subaĉeti ilin.** Ideologie, nia referenco estas la *Deklaracio pri la esenco de la afrika esperantismo,* lanĉita en 2005 kaj aprobita de la Afrika Kongreso de Eo en 2015.

Eksteraj agnoskoj pri Eo dependas precipe de la aktiveco de niaj paktintoj, kuplitaj al prestiĝaj tegmentaj organizoj: PEN Internacia, Naturamika Internacio, Internacia Konsilio de Virinoj... Por la Civito mem gravas la rilatoj kun subjektoj strebantaj al internacia agnosko, kiuj situas interalie en UNPO. **Devas kreski nia diplomatia kompetento**: tiucele la ekesto de legacioj en Eŭropo estis grava paŝo.

Geopolitike la nuna majoritato opinias ke **Unuiĝintaj Nacioj bezonas reformon en mondfederisma direkto**, laŭ la indiko de Edmond Privat en *Federala sperto*. Ni subtenas la strebojn al tio. Ĉiuokaze, nek UN nek Unesko ŝajnas indaj je aŭtomata subordiĝo, male al la sintenado en la malnova Esperantio.

Ni **zorgas ankaŭ pro la sorto de Eŭropa Unio**, kiu post la brita secesio kaj pro la interslava milito pli kaj pli subordiĝas al NATO.

La nuna Kapitulo kuraĝis kondamni la agreson de Rusio al Ukrajno kaj samtempe protesti pri la cenzuro kontraŭ la rusa lingvo en Ukrajno. **Nia prioritato restas ĉe Konsilio de Eŭropo**, kompare kun Eŭropa Unio, UN, Unesko. La Konsilio vere okupiĝas pri homaj rajtoj kaj lingvopolitiko,



**Lorena Bellotti**
**(Italio, 5 septembro 1960)**

El la provinco kun Sabloneto, kie estis promulgita la Civita konstitucio. Eksdirektoro de lingva lernejo.

Poligloto, patrino de du plurlingvaj infanoj, loĝas nun en la Kanariaj insuloj.

Eklernis Eon en 1985. Reprezentas Eon en ALTE nome de KCE. Forumano delegita de IIC en 2018. Senatano ekde 2020. Vickonsulo pri klerigado.



**Koffi Gbeglo**
**(Togolando, 18 aprilo 1957)**

La plej fama E-isto el la nigra Afriko. Instruisto, lernejestro kaj verkisto. Eksakademiano, Lingva Komitatano.

Eklernis Eon en 1984 kaj aktivis kiel asistanto de Hans Bakker, lia E-patro, danke al kies helpo li starigis Institut Zamenhof en Lomeo. Forumano delegita de la Esperanta PEN. Eksestrarano de UEA.

## Senato 2025-2029

La esperanta civitanaro estas vokita renovigi la Senaton laŭ regula kvinjara kadenco, fine de la konstitucia mandato. Bedaŭrinde la eliranta Konsulo, Riichi Karibe estis malsana, kaj demisiis la Unua Vickonsulo; sed la Kapitulo tre bone funkciis.

La baloto ekas per la publikigo de ĉi tiu gazeto kaj ĉesos la 15an de decembro 2024 (la Tago de la Esperanta Kulturo) per la skrutinio.

La ĉefkandidatoj de la gajnonta listo estos la novaj Konsulo kaj Vickonsulo. La eniranta Konsulo interkonsentos kun la eliranta pri la kunvoko de la inaŭgura sesio de la nova Parlamento (Senato kaj Forumo).

Voĉrajtaj estas ĉiuj personoj kun la esperanta civitaneco atingintaj la dekokan jaron je la 30a de novembro 2024. Pli da detaloj pri la balota proceduro en aliaj paĝoj de la gazeto.

## Kial ĉi tiu numero?

La Esperanta Civito luis numeron de *Heroldo de Esperanto,* kiel kutime kiam okazas la elektoj al la Senato. KCE ne responsas pri la enhavo, sed la redakcio de HdE volonte helpis al la enpaĝigo.


La retagentejo HeKo fariĝis unu el la ĉefaj kanaloj por sciiĝi pri la E-mondo, en taŭga kombino kun la paperaj periodaĵoj aliĝintaj al la Pakto, interalie HdE. Fakte HeKo estas unu el la du plej ĝisdataj novaĵagentejoj pri Esperantio.

Danke al la entrepreno Tramontana kaj al c-ano Alessio Giordano HeKo akiris novan, pli modernan veston. Al tio paralelas la nova retejo pri *Literatura Foiro* kaj LF-koop <literaturafoiro.com> kaj la preparata retejo kun katalogo pri varoj kaj servoj el la tuta konsorcio.

Ekzistas ankaŭ Facebook-paĝoj kaj ne mankas la ĉeesto en *Eventa Servo*.

Dum la venonta parlamenta mandato la Kapitulo registru la novaĵagentejon ĉe diversaj entoj, kaj entreprenu partan plurlingvigon. Tial grandiĝos ankaŭ la parto rezervita al informoj pri eŭropaj kaj mondaj institucioj.

**Sendepende de kiu gajnos, nia demokratio bezonas financadon. Ni dependas de neniu ŝtato, partio aŭ eklezio. Bv donaci al Pro Esperanto, IBAN CH8809000000230048030.**




Riichi Karibe (Konsulo) kaj Giorgio Silfer (Vickonsulo) lasas definitive la Senaton.

Ili gvidis la leĝodonan kaj ekzekutivan povon dum la lasta mandato.

La gekolegoj dankas kaj gratulas.

## Civito bezonas kaj Popolon kaj Dion



Polis, Ecclesia, Ummah

La nova Esperantio estas kreskanta pli malrapide ol la malnova estas ruinanta. Jam antaŭ jarkvino UEA ekperdis sian strategian signifon, kaj de rimedo ĝi fariĝis celo en si mem. Nia kristana civitano Vinko Oŝlak asertas ke la malnova kuntrenas la lingvon en sian falon, ĉar ĝi ne plenumas la volon de Dio. Ĉu la Esperanta Civito kreskus pli rapide, **se ĝi estus gvidata de Senato etike pli engaĝita ol la nuna**? Certe indas ekrilati kun religiaj konferencoj, por prezenti la valorojn etike kuplitajn al nia lingvo

La modifo de la Konstitucio, per la forigo de tro granda balotpremio, estis granda venko de la Blanka opozicio, en 2017. Ne eblas telematike kunsidigi la Parlamenton, kaj ni ne batalos por amendi la Konstitucion tiudirekte. Sed la opozicio insistos por pli rekta demokratio, per pli oftaj referendumoj, kaj tiucele ĝi **studos amendon al Lex Referendaria, kiu rajtigu perretan voĉdonadon**.

Ni devas fari pli multon por la E-familioj. En ĉi tiu kampo endas kaj kritiko al la majoritato kaj memkritiko ĉe la opozicio. Blankanoj **insistos ĉe la Kongresa buroo por realigi Renkontiĝon de E-Familioj.**

La Blanka Listo subtenas familion kiel kernon de la homa socio, sed **nur kun gepatroj de malsama sekso,** laŭ la difino en la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj. Do neniu apogo al la egaligo de la samseksaj paroj al la geedzaj, nenia subteno al revizio de *Lex Valeria* (pri la familia juro) tiudirekten.

Rilate kristanismon, la Blankanoj referencas al la eklezioj kun pli moderna koncepto pri la rolo de la virinoj.

Kritikinda estas la malsufiĉo en la formado de pli kaj pli da instruistoj de nia lingvo ene de la Esperanta Civito. Dum la nova mandato **LTSEC asociigu afrikanojn en la preparo de la testoj**, kun atento al afrikaj kulturoj kaj do konforme al la afrika ĉiutagaĵo.

La Blankanoj volas **defendi la investojn ekster Eŭropo**: Afrika E-Instituto havas en tio ŝlosilan rolon, kiel centro por ellerni kaj nian lingvon kaj ĝian kulturon, por ke baldaŭ Afriko okazigu gravajn eventojn proprarimede. Al afrikaj E-aranĝoj inviti ankaŭ ne E-istan publikon. Ni insistos ĉe la Civita banko por helpi afrikanojn trejniĝi, liberiĝi kaj precipe memfinanci sin.

La Civito estu multe pli malfermita al la E-istoj en la evolulandoj, multe pli helpu ilin en ilia laboro en Esperantio. La Blankanoj **laŭdas la grandan laboron de c-ano Giorgio Silfer** en Burundio, Togolando kaj Senegalio, sed nun timas ke ĝi ne daŭros adekvate, pro lia retiriĝo post 20-jara aktiveco. **Ili petas garantii la daŭrigon de tiu grava laboro.**

***La ĉefkandidatoj de la Blanka Listo***

**Ankaŭ ĉi-foje estas averaĝe multaj kandidatoj: 32, mezume po 16 laŭliste; same kiel en 2019 kaj 2016. Rekorda la aĝa paletro: la plej maljuna havas 86 jarojn, la plej juna nur 25. La meza aĝo restis la sama de 2019: 55 jaroj.**

**Precipe danke al unu el la du listoj, la proporcio de la seksoj restis la sama: unu el tri kandidatoj estas virino. Kaj ambaŭ ĉefkandidatoj estas virinoj. Neniam UEA kaj SAT (kaj la Akademio de Eo) estis prezidataj de virino (sed jes TEJO kaj la Esperanta Civito). Kandidatoj naskitaj en Afriko estas sep, iom malpli ol kvarono; sed ambaŭ vicĉefkandidatoj estas afrikanoj. Tial la Esperanta Civito estas tre malfermita kaj al Afriko kaj al virinoj.**



**Anna Bartek / Anjo Amika**
**(Hungario, 19 junio 1955)**

Profesia kantistino: realigis kasedojn kaj diskon en Eo. Studis esperantologion ĉe KCE, kie ŝi delonge aktivas.

Orfa de la infanaĝo, estis ĉiam tre sentema pri la familia temaro. Konfesie luterana. Senatano je la sesa mandato.

Kunfondis Feminisman Esperantan Movadon kaj Fajszi Amikan Rondon.




**Lucien Kagina**
**(Burundio, 6 januaro 1972)**

Administrinto de publika entrepreno, nun profesoro en duagrada mezlernejo.

Konsiliano de Afrika E-Instituto, kaj ties delegito ĉe la Forumo. Edzo, patro de kvin infanoj. Li eklernis Eon en 2003 kadre de SIPU.

Socie engaĝita, li diligentas por administrado kaj publikaj rilatoj.

# La strukturo de la demokratio en la Esperanta Civito




***Pakt/o**: libervola interkonsento pri rilatoj inter la koncernaj partioj. (NPIV)*

# Kiel voĉdoni por la nova Senato? Legu atente!

**Rajtas voĉdoni nur la plenaĝuloj kiuj havas la esperantan civitanecon je la 30ª de novembro 2024.**

La skrutinio okazos la **15ªⁿ de decembro 2024** en la sekvaj balotejoj:

1) **Altekvatora** – por ĉiuj rezidantoj en afrikaj landoj norde de la ekvatoro, escepte de Kongolandoj: *Institut Zamenhof en Lomeo (Togolando);* sendi la balotilon al: *Esperanto, 11 BP 48, Lomé 11, Togolando*.

2) **Subekvatora** – por ĉiuj rezidantoj en afrikaj landoj sude de la ekvatoro, escepte de Kongolandoj kaj Ruando: *Tanganika Esperanto-Domo (Burundio);* sendi aŭ liveri la balotilon al: *Esperanto-Domo, Kibenga-Lac 4, Bujumbura, Burundio*.

3) **Konga** – por ĉiuj rezidantoj en Kongolandoj kaj Ruando: *la Zamenhofa festo en Uvira (Kongolando);* sendi aŭ liveri la balotilon al: *Esperanto, Avenuo Kitundu 27, Kakombe, Uvira, RDC.*

4) **Balkana** – por ĉiuj rezidantoj en Albanio, Bosnio, Bulgario, Makedonio, Rumanio, Serbio kaj Turkio: *Esperantista Domo de Kulturo en Razgrado (Bulgario);* sendi aŭ liveri la balotilon al: *Esperantista Domo de Kulturo, Sv. Kliment 36 ap. 1, BG-7200 Razgrad, Bulgario*.

5) **Balta** – por ĉiuj rezidantoj en Danlando, Finnlando, Germanio, Norvegio, Pollando, Svedio, iama Sovetunio kaj Kaŭkazaj teritorioj: *Zamenhofa festo ĉe la Norda Legacio en Stokholmo (Svedio);* sendi aŭ liveri la balotilon al: *Bertil Nilsson, Biskop Brasks gränd 25, SE-176 76 Järfälla, Svedio*.

6) **Iberia** – por ĉiuj rezidantoj en Andoro, Hispanio (inkluzive de Eŭskio, Galegio, Katalunio), Portugalio, Ĝibraltaro: *Naturamika Esperanto-Domo en Malago (Hispanio);* sendi aŭ liveri la balotilon al: *Esperanto-Domo, C/ Ricardo de la Vega 14, ES-29018 Málaga, Hispanio*.

7) **Mediteranea** – por ĉiuj rezidantoj en Grekio, Israelo, Italio, Malto, San-Marino: *Zamenhofa festo en Padovo;* sendi aŭ liveri la balotilon al *Prof. Carlo Minnaja, via A. Cavalletto 6, IT-35122 Padova, Italio.*


8) **Mezeŭropa** – por ĉiuj rezidantoj en Aŭstrio, Ĉeĥio, Hungario, Kroatio, Liĥtenŝtejno, Slovakio, Slovenio, Svislando: *KCE en Ĉaŭdefono (Svislando);* sendi aŭ liveri la balotilon al: *Pro Esperanto, Postiers 27, CH-2300 La Chaux-de-Fonds, Svislando*.

9) **Okcidenteŭropa** – por ĉiuj rezidantoj en Belgio, Britio, Francio, Irlando, Islando, Luksemburgio, Monako, Nederlando: *Zamenhofa festo en Londono;* sendi aŭ liveri la balotilon al: *Stano Keable, BCM Box 8932, London WC1N 3XX, Britio*.

10) **Pacifika** – por ĉiuj rezidantoj en Amerikoj, Oceanio kaj Azio, sed sen Israelo, Turkio, iama Sovetunio kaj kaŭkazaj teritorioj: *Zamenhofa festo en Meksikurbo;* sendi aŭ liveri la balotilon al: *Luis Raudòn, C/ Andres Sufrend 267, Costa Azul, MX-39850 Acapulco (GRO), Meksiko.*

11) **Subbalotejoj** – se petite de la lokaj rezidantoj, eblos subbalotejoj en areoj periferiaj pro geografia, katastrofa, religia aŭ politika konjunkturo (ekzemple Nepalo, islamanoj en Burundio, Venezuelo).

# Balotilo por la Senato de la Esperanta Civito

| Verda Listo | Blanka Listo |
|---|---|
|  |  |
| por Civito laika, progresema, ekologia | Civito bezonas kaj Popolon kaj Dion |
| O Lorena **Bellotti** | O Anna **Bartek** (Anjo Amika) |
| O Koffi **Gbeglo** | O Lucien **Kagina** |
| O Charlotte Florence **Batuseka** | O Alessandro **Beltramini** |
| O Manuela **Blanco** | O Mushosi **Birindwa** |
| O Oriane **Condé** | O Abdul Rahman **Bukuru** |
| O Giorgio **Di Nucci** | O Alexander **Holevitch** |
| O Roland **Eriksson** | O Tihomir **Lovrić** |
| O Rubèn **Fernández** | O Georgi **Mihalkov** (Julian Modest) |
| O Alessio **Giordano** | O François-Mauriack **Nunda** |
| O Antonio **Justicia** | O Honoré **Sebuhoro** |
| O Miroslava **Kirova** | O Péter **Szilvássy** (Petro Pruna) |
| O Perla **Martinelli** | O Aléxandrine **Tshamena Omba** |
| O Zlatoje **Martinov** | O Kalle **Vilbaste** |
| O Laura Lajo **Miller** | |
| O Frédéric **Nimubona** | |
| O Fernando **Pita** | |
| O Hubert Michael **Schweizer** | |
| O Cristina **Stefani** | |
| O Ana **Velasco** | |

***maksimume, samliste:***
***du preferoj inter la du ĉefkandidatoj***
***tri preferoj inter la ceteraj kandidatoj***

*En la indikitaj lokoj estos urno, videbla al la publiko, kie la elektantoj enmetas la propran balotilon kaj samtempe la rajtigito enmetas la balotilojn ricevitajn poŝte de la koncernaj landoj, malferminte la specifajn kovertojn publike.*

***Por voĉdoni per poŝto:** eltondu la subajn balotilojn (eblas uzi fotokopion, samdimensian, sur **blanka** papero). Streku per **globskribilo** iksan krucon sur **nur unu emblemo**. Hoku **maksimume tri** preferatajn nomojn (**maksimume kvin, se vi inkluzivas la du ĉefkandidatojn**) en la sama listo.*

***<u>Ne eblas voĉdoni por unu listo kaj samtempe por kandidato de alia</u>*** (panachage).

*Sen indiko pri preferataj kandidatoj (nur kruco sur emblemo) via voĉo estos kalkulita kiel prefera nur por la du ĉefkandidatoj.*

***Faldu la balotilon kvarone internen. Aldonu la du balotilojn por la referendumoj.***

*La balotiloj devas eniri en koverton (fermendan). Sur tiu koverto skribu la kodnumeron de via Civita legitimilo, aŭ viajn naskiĝdaton kaj subskribon. Fermu la koverton kaj sendu ĝin al la koncerna balotejo. Enmetu ne pli ol unu senatan balotilon en la koverton por ne riski senvalidigon. **Kaze de dubo:***

***<civito@esperantio.net>***

# VERDA LISTO:



**Charlotte Florence Batuseka**
**(Kongolando, 2 aprilo 1995)**

Kantistino. Eklernis nian lingvon en 2016. Formiĝis kiel esperantologo ĉe AfrES 2017, organizita de Afrika E-Instituto. Delegito de la societo UEDU en la Forumo, post la morto de Augustin Kuluba Mbomba.

Patrino de unu infano, se elektite ŝi portus en la Senaton la voĉon de afrikaj patrinoj kaj junulinoj.



**Manuela Blanco**
**(Hispanio, 14 januaro 1977)**

Devenas el Estremaduro kaj loĝas unuope en Andaluzio. Laboras ekde sia dekkvara aĝjaro, en fabriko, vendejo, restoracio.

Eklernis Eon en 2017. Diplomo C1 laŭ LTSEC. Staĝis kiel plurcela kadro en la Civita stabo. Aktivas en Esperanta Naturamikaro, kunorganizas eventojn. Eliranta vickonsulo pri internaj aferoj. *Esperanto? mia universitato!*



**Oriane Condé**
**(Francio, 2 marto 1972)**

Formite en la vendosektoro, evoluis kiel subtena edukistino. Vivas en la sudo de Francio.

Denaske dulingva, maturiĝis al atento pri interkulturaj demandoj.

Patrino de du filoj, el kiuj la dua kreskis kvazaŭ denaske E-isto danke al la avino (la iama Konsulino Marie-France Conde Rey). Danke al tio ŝi mem eklernis Eon en 2016.

# Progresigi la paktintojn

Ni celas analizi por ĉiu paktinto la gradon de agado, proksimeco al la Civito kaj plifortigi interrilatojn elstarigante la iniciatojn proponitajn de ĉiu establo, kaj inkludante novajn grupojn.

Serve al ĉiuj paktintoj ni planas
- analizi kaj kompletigi la retejon *esperantio.net;*
- varbi novajn, kun prioritato al ne kovritaj segmentoj;
- konsideri ĉu reaktivigi la ĉesintajn aŭ eksigitajn laŭ Reglamento;
- akurate registri organigramon kaj stabon;
- helpi ilin akiri juran personecon, se ne jam havas;
- helpi ilin aĉeti/heredi propran nemoveblaĵon;
- helpi ilin organizi transnacian eventon je regula kadenco.

**La Civito estas kompleksa strukturo, kiu bezonas kapablajn administrantojn, kun kompleta superrigardo pri la situacio, por taksi kiel agi en la intereso de la esperanta popolo.**

**Tial ni proponas konstantan trejnadon por stabanoj, por la apliko de *Lex adiutoria*.**

**Tiu trejnado koncernu ankaŭ parlamentanojn. Ĝia antaŭkondiĉo estas trejnado de trejnistoj, kiu okazu en Eo, ĉar la lingva bazo estas esence grava.**

# Koherigo/iĝo

Ne temus pri milda centralismo, kiun la Verdanoj draste rifuzas, kiel normale en federisma subjekto de internacia juro; sed pri strebo al kongrueco inter la paktintoj.

Necesas komuna organiza stilo, kiu privilegias transnaciecon kompare kun naciismo; kiu valorigas la E-lingvan klerigon paralele al inteligenta etnolingva informado; kiu konas manaĝeran disciplinon, sed ene de partopreniga konsultado. Kaj helpas la pli malfortajn laŭbezone.

Tio signifos pli da subsidueco, eventuale pli da volontulaj instancoj, kiel pruvas la Kongresa Buroo, kreita lastatempe por subteni kaj konsili la organizantojn de eventoj.

# Informado

La Civito baziĝas sur rekta homa kontakto, kaj favoras interhomajn rilatojn kiel naturan rimedon por komuniki, kleriĝi, klerigi.

Sed gravas ankaŭ ceesti en la virtuala mondo por ebligi al la interesatoj ricevi la proponojn kaj proksimiĝi al la aktiveco de la konsorcio.

Fakrondo jam ekzorgis pri retpaĝoj, sociaj retoj kaj cifereca komunikado. Ĝi daŭrigu laŭ la kompetentoj pri la virtualo por

a) kolekti kaj kunigi retlistojn: @poŝte, podkaste, vacape Telegrame...

b) inventari FB-paĝojn laŭ ilia utilo por la esperanta popolo.

Samtempe ne neglekti aliajn informrimedojn, kiel la komikson *Esperantio vivas*.

**Ekster Esperantio kreskas la atento pri nia lingvo kaj ĝia parolkomunumo kiel fenomenoj interesaj en si mem, paralele al la krizo de la malnovaj organizoj.**

**En tiu konjunkturo certe la Esperanta Civito povas kaj devas ludi gravan rolon.**

# Dutegmenteco

"Duobla tegmenteco" povus esti la devizo por la strategio de la Kapitulo pri la publikaj rilatoj de niaj paktintoj; strategio apogata ankaŭ de la opozicio.

Tial jam kvar gravaj paktintoj referencas al tegmentaj organizoj ekster Esperantio: KCE al ALTE, la Esperanta PEN al PEN Internacia, la Naturamikaro al NFI, FEM al IKV.

La duobla tegmenteco helpas al la konsorcia disvolvo de publikrilata strategio, ne lezante la eventualan neŭtralecon de la paktintoj.

Laŭ la Verda Listo la ekesto aŭ la aliĝo de novaj, fakaj establoj devus kongrui kun duobla tegmenteco – tia ekzemple estus Civila E-Servo, kiu dum la nuna mandato fondiĝis kiel memstara establo; aŭ de SIPU, en kies asemblea tagordo situas de pli ol jaro la aliĝo al la Internacia Buroo por Paco.

Tio klarigas ankaŭ nian atenton pri asocioj kun tegmenta organizo ekster Esperantio, kiel TEJO. Kaj precipe nian strebon por aligi Civitajn instancojn al ekstera konsorcio: ekz. HeKo al la federacio de novaĵagentejoj.




**Perla Martinelli**
**(Italio, 30 junio 1938)**

Ĉefredaktoro de *Literatura Foiro*. Doktoro pri lingvoj. Instruisto kaj tradukisto. Eklernis Eon en 1953.

La sola virino elektita al la estraro de la Akademio de Eo, nun dojeno de la Lingva Komitato.

Redaktis la revuon *Femina*, prezidis ĉe LF-koop, KCE kaj PEN. Delegito de LF-koop ĉe la Forumo de la Esperanta Civito. Poligloto, vivis en pluraj landoj.



**Zlatoje Martinov**
**(Serbio, 16 decembro 1953)**

Publicisto. Ĝis 2018 ĉefredaktoro de serba politika revuo kaj de la kultura revuo *Literatura Foiro*.


Eklernis Eon 1971 kaj formiĝis en la idealisma medio de Tibor Sekelj. Prezidis Vojvodinan E-Ligon (1975-77), estrarano de Serbia E-Ligo (1979-84 kaj 1988-92). PEN-ano ekde 1998. Aŭtoro de pluraj literaturaj tradukoj en kaj el Eo, recenzoj, fakaj artikoloj.

# POR CIVITO LAIKA, PROGRESEMA, EKOLOGIA




**Giorgio Di Nucci**
**(Italio, 16 aprilo 1997)**
Muzikisto, specife pianisto kaj operkantisto. Perfektiĝas en itala konservatorio. Kunrealigis la diskon *Kanti klasike.*

Eklernis nian lingvon en 2012, formiĝis en la Esperantologia Fakultato de KCE. Prezidis la italan sekcion de TEJO, kunorganizis Internacian Junularan Festivalon, aktivas en la teamo de Kultura E-Festivalo.



**Roland Eriksson**
**(Svedio, 4 junio 1952)**
Kun Agneta Emanuelsson formas perfekte dulingvan E-paron, pro komunaj interesoj kulture, socie kaj politike.

Lernis la lingvon en 2004. Nuna delegito de Feminisma E-Movado ĉe la Forumo. Aktiva en la instruista E-medio. Tipe bonhumora skandinavo.



**Rubèn Fernández**
**(Hispanio, 22 oktobro 1974)**
Edukite en du lingvoj, aliajn li aldonis en sia vivo, inkluzive de ekzotikaj kaj de Eo (ekde 1998), kiun li instruas oficiale en kataluna universitato.

Okupiĝas pri lingvaj rajtoj laŭ internacia horizonto. Profesia fakulo pri bibliotekoj kaj arĥivoj, kunlaboras kun KCE.



**Alessio Giordano**
**(Italio, 27 majo 1997)**
Publicisto. Vicĉefredaktoro de *Literatura Foiro*. Universitataj diplomoj pri lingvoj, kaŭkazologo. Studadas filozofion kaj muzikon.

Eklernis Eon en 2018, sed jam posedas diplomon C2 laŭ LTSEC. Kompetentas pri informadiko, specife grafiko kaj enpaĝigo. Gastronomie talenta (lia patrino estras restoracion).

Diligenta kaj laborema.



**Antonio Justicia**
**(Hispanio, 23 julio 1957)**
Konstru-inĝeniero, andaluzo, E-iĝis en 2019. Faka konsilanto de fondumo Pro Esperanto rilate flegadon de nemoveblaĵoj.

Tuta paletro de diversaj kulturaj interesoj, ne ĉiuj tipe E-istaj: ekzemple ŝatas la aranĝojn en la Civita konsorcio, ĉar almenaŭ ili estas gastronomie laŭdindaj, kaj ne nur klerigaj.



**Miroslava Kirova**
**(Bulgario, 2 novembro 1957)**
Administra funkciulo en la Ekonomika Universitato de Varno, kie ŝi eklernis Eon danke al prof. Giorgio Silfer kaj lia amiko Ljubomir Trifonĉovski (naskita precize 365 tagojn post ŝi!).

Eliranta vickonsulo pri socialaj aferoj. Stabano de LF-koop.

Patrino de du gefiloj, el kiuj unu ankaŭ lernis Eon (staĝantino ĉe KCE) kaj petis la civitanecon.

## Kongresa buroo

Kreite dum la ĵusa mandato, la kongresa buroo iĝis tre aktiva interna instanco, preskaŭ same kiom la Registro.

Ĝia celo estas subsidui al la paktintoj okaze de gravaj aŭ transnaciaj aranĝoj, kiel KEF ĉe KCE en Svislando aŭ NAKSE ĉe ENa en Katalunio ekde 2023.

La aranĝoj multiĝis: jen DER de FAR en la danuba areo ekde 2024, EKA de AEI en Afriko ekde 2025, la planata krozado de PEN sur la okcidenta Mediteraneo en 2026.

Sed la kongresa buroo ankaŭ prospektoras aliajn situaciojn, kiuj ŝajnas krizi: en Pollando, Francio, Italio, Skandinavio.

La Civito ne organizas mem, ĉiu paktinto havu sian transnacian eventon. Tiu ĉi strategio diverĝas de la Blankanoj, kiuj volus grandan civitanaran kongreson.



La devizo povus esti: al ĉiu paktinto la propra evento kaj la propra domo. Por la dua celo aktivas alia Civita instanco, konsorcie plej grava: Pro Esperanto – por la kresko de la E-popolo en la sektoroj sociala, financa, konstrua.

## La sama defio

Validas la sama defio: konstrui novan Esperantion dum la malnova ruinas. La lastaj kvin jaroj vidis la akcelon de tiu ruina procezo, sed nia konstruado ne iras same rapide.

La Verda Listo liveris ĝis nun la kadrojn por la mastrumado kaj la ekspansio de la nova subjekto: nun necesas fortigi la kapablon inkludi pliajn fortojn, ĉu rekte produktante ilin ĉu proksimiĝante al ankoraŭ sanaj partoj de la malnova Esperantio.

La formado restas prioritata en tiu procezo: ni bezonas trejni kunordigantojn kaj administrantojn, klerigi ilin esperantologie, kreskigi la stabanojn kulturpolitike, formi testistojn kaj andragogojn, bredi oratorojn.

> **La intereso pri denaskismo restas fundamenta ĉe la raŭmistoj. La fenomeno fariĝas pli kaj pli grava, ankaŭ paralele al la krizo de tradiciaj organizaj strukturoj. La atento devus koncerni kaj la familion kaj la plenkreskan denaskulon.**

## Ekster Eŭropo

Afriko restas prioritato, sed la lastaj mandatoj vidis kreskon de intereso pri aliaj kontinentoj, unuavice Ameriko.

Tiun ekstereŭropigon atestas denove la Verda Listo, kun du amerikaj kandidatoj, bedaŭrinde ne plu kun azia.

Okazis la unuaj parlamentaj sesioj ekster Eŭropo, en Burundio – certe reokazos, se estos pli da afrikaj parlamentanoj.

## Fokuso al bibliotekoj kaj arkivoj

La sinkon de la malnova Esperantio atestas plej kruele la sorto de bibliotekoj kaj arkivoj: ĉe UEA en Roterdamo, CDELI en Ĉaŭdefono, en Belgio (Kortrejko) kaj aliloke.



La direktivo Giordano (aprobita de la Forumo en 2022) celas savi kaj rekuperi tiun kulturan trezoron, duoble minacatan: de la publikaj institucioj kaj de la E-ista malsufiĉo.

Komuna Integrita Biblioteka kaj Arkiva Sistemo aplikas novan strategion, kiu karakterizos la venontajn jarojn, laŭ la Verdanoj.

## Horizontoj de la nuna Esperantio

La simpozio de Ĉaŭdefono, 1-3 novembro 2024 grandparte inspiros nian agadon. Sufiĉas konsideri la demandojn kaj la respondojn de pluraj kompetentuloj, en kaj ekster la Esperanta Civito:

**Perla Martinelli**
Lingvaj institucioj: ĉu aktualaj en Esperantio post jardeko?
**Lorena Bellotti**
Inter KEFR kaj KER: kia perspektivo por lingvotestado en Esperantio?
**Manuela Blanco**
Tegmentaj internaciaj asocioj kun E-sekcio: kia perspektivo?
La sperto de Esperanta Naturamikaro.
**Rubeno Fernández**
Griza aŭ roza? Horizonto de bibliotekoj kaj arĥivoj en Esperantio.
**Alessio Giordano**
Movadoj kun sinkrona dimensio, mikrosocio kun diakrona retrospektivo.
**Stano Keable**
Ĉu Esperantio havos ankoraŭ laboristan aŭ progreseman movadon?
**Jerzy Leyk**
Kiam malaperis la E-movado? Kiu perspektivo nun?
**Francesco Maurelli**
Subvencioj, kotizado, legacoj, investoj en Esperantio: kiaj ebloj?
**Orlando Raola**
Diaspora komunumo kaj porlingva premgrupo: kia horizonto?
**Giorgio Silfer**
De neregistara organizo al subjekto de internacia juro:
kiuj diferencoj en teorio kaj praktiko?

## Investostrategio

La Verda Listo ĉiam subtenas la evoluon de la fondumo Pro Esperanto (FPEF) kiel financa societo kun karakterizoj de alternativa etika banko.

Paralele gravas daŭrigi la strategion investi en la "malnova ekonomio": nemoveblaĵoj, prefere ol akcioj, biloj, obligacioj. Tio povas inkluzivi ankaŭ la konsiladon al E-Domoj ekster la Pakto: ja pli ol unu travivas krizon.

La rezulto estas tre pozitiva: la E-Domo de KCE valoras la kvinoblon de sia prezo en 1999; la naturamika E-Domo valoras la trioblon de sia prezo en 2012; kaj tiel plu. Ĝis nun en tio rolas FPEF kiel regio, sed koopere al FPEF en la venonta mandato aktiviĝos Civila E-Servo.

## Civilaj rajtoj

Civilaj, homaj, lingvaj rajtoj: jen la fundamento de nia geopolitika strategio.

Ni proponas daŭrigi la rilatojn kun la subjektoj ene de UNPO kaj kun la mondialistoj serioze aktivaj por la reformo de UN en federisma direkto, laŭ la idealo de Edmond Privat kaj Pierre Ceresole.

Ni proksimas al pacifismaj organizoj, sed ne je la kosto de troa indulgo al tiuj kiuj ne respektas la menciitajn rajtojn. Ni proksimas al lingvaj minoritatoj kaj indiĝenaj popoloj, per kulturaj prioritatoj.

Ni restas kun la demokratia okcidento, sed ne aprezas la ekonomia globalismon aksitan sur la dolaro-sistemo. En la koncernaj debatoj la Civito partoprenu.

## Kleriĝo/klerigo

La ĉefaj rajto/devo laŭ nia Konstitucio estas aparte karaj por la Verda Listo. Tial ĝi forte apogas la konstantan edukadon aŭ andragogion.

Ŝlosila punkto por tio estas la starigo de la Esplora Instituto de Esperantologio, kies nivelo de teleuniversitato devas kongrui kun la bezonoj de formado.

La ĉeso de la kursaro ĉe universitato "Adam Mickiewicz" en Poznano devas akceli la lanĉon de EIE. Ni bezonas kursaron kiu ne sin apogas al monsuĉa institucio ekster Esperantio, ni devas mem krei nian universitaton.

Al EIE povos konverĝi ankaŭ la sciencaj institutoj, kiuj agadis ekzemple pri zamenhofologio.

## Sekureco

Dum la lastaj jaroj kreskis la demando pri sekureco dum la E-kongresoj, precipe de TEJO kaj ILEI. La direktivo Eriksson donis respondon flanke de la Civito.

La demando leviĝis unuavice pro seksa molestado al knabinoj, sed ĝi koncernas pli ĝenerale la konduton en la E-medio.

Grava eraro estus identigi la demandon kun specifa areo de la mondo: kazoj de agreso koncernis virojn el tri kontinentoj.

La Verda Listo situas en unua vico por defendi la rajtojn de virinoj, prevente kaj konsekvence – bedaŭrinde Esperantio ne estas imuna de tiuj problemoj. Perforto kaj nombra malsupereco akompanas nesufiĉan lingvokonon.



**Laura Lajo Miller**
**(Usono, 16 decembro 1946)**
Usonangla hebreino loĝanta en Londono. Doktoro, publicisto. Politike engaĝita, ideologie marksisma.

Aktiva kiel estrarano en la strukturo de E-Asocio en Britio.

Nenia rilato kun Laura Miller, kantistino kaj fianĉino de la impresario Leo Travaglio, la mastro de "Esperanto" (diskoteko en Bonaero).



**Frederiko Nimubona**
**(Burundio, 5 aprilo 1973)**
Instruisto kaj organiza konsilisto. Patro de kelkaj infanoj.

Eklernis Eon en 1999. Aktiva pacifisto, prezidanto de Societo Internacia por Paco Universala, konsiliano de Afrika E-Instituto. Fakulo pri interetnaj demandoj.


Kunfondis Afrikan E-Instituton kaj kunorganizis du Afrikajn Esperantologiajn Semajnojn kaj Afrikan E-kongreson.



**Fernando Pita**
**(Brazilo, 1 junio 1969)**
Universitata profesoro kaj tradukisto. Lingvistika redaktoro de *Literatura Foiro*. Ano de la Esperanta PEN. Estrarano de ILEI.

E-isto de sia adolesko, partopreninto en diversaj lokaj kaj naciaj asocioj, li verkis (kaj verkas) kaj/aŭ tradukis diversajn librojn pri Eo kaj ĝia kulturo.

Progresemulo, subtenanto de la indiĝenaj lingvoj, ne spiritisto.



**Hubert M. Schweizer**
**(Germanio, 26 aŭgusto 1943)**
Naskiĝis en Badenlando, loĝas en Dresdeno. Studis filozofion, psikologion kaj pedagogion, specialiĝis pri lingvoj kaj religio. Diplomita naturkuracisto, unua eŭropa disĉiplo de la Yumeihomasaĝo. E-isto ekde 1973.

UMEA-ano, aktivis en ILEI. Prelegisto, eseisto, publicisto. Antropozofo kaj framasono, ordinita katolika pastro.



**Cristina Stefani**
**(Italio, 18 decembro 1976)**
Entreprena kadro, aktiva publikrilate. Eklernis Eon en 2021 ĉe KCE per kurso de prof. Giorgio Silfer. Diplomo A2 laŭ LTSEC. Helpis dum IIC-seminario.

Ŝi akceptis kunlabori kun KCE pri Esplora Instituto de Esperantologio, specife pri rilatoj kun aliaj teleuniversitatoj.



**Ana Luisa Velasco Gonzaga**
**(Meksiko, 7 majo 1970)**
Komputinĝeniero, dezajnisto, komercisto. Pro sia diplomo E-rilata ricevis la stipendion Ivo Lapenna. Dufoje patriniĝis.


Apenaŭ 11-jara eklernis Eon okaze de la meksika IJK: ŝin instruis la fratino. Tradukis el la meksika beletro, ankaŭ kantojn. Organizis en la ĉefurbo konversaciajn E-kunvenojn. Tre populara en Facebook.

# BLANKA LISTO: CIVITO BEZONAS KAJ POPOLON KAJ DION



**Alessandro Beltramini**
**(Italio, 4 novembro 1972)**
Manaĝero en la sektoro de la granda distribuado. Patro de tri infanoj. Romkatoliko.


Lerninte Eon en 1987 ĉe la medio de LF-koop, li aktivis en la itala sekcio de TEJO, por kiu li kunorganizis Internaciajn Junularajn Festivalojn. Li staĝis en La Kvinpetalo kaj ĉe KCE. Malgraŭ la ŝvarca rimo "edzino / fino" li praktikadas nian lingvon.



**Mushosi J. T. Birindwa**
**(Kongolando, 1 septembro 1972)**
Instruisto pri la angla kaj pri librotenado. Politika rifuĝinto, nun loĝas en Burundio. Kristana intelektulo.

Eklernis Eon en 1998, C1-diplomito. Membro de UEA, kunlaboras kun ACE kaj kun SIPU. Vicprezidanto de UETA.

Formita en AfrES kiel esperantologo. Jam du mandatoj plenumitaj en la Senato.



**Abdul Rahman Bukuru**
**(Burundio, 5 januaro 1996)**
Konstru-inĝeniero. Gvidanto de Islama Esperanta Klubo. Eklernis Eon en 2017, diplomiĝis je C1.

Partopreninte en kelkaj Afrikaj Esperantologiaj Staĝoj, deĵoris en la Tanganika E-Domo dum pluraj monatoj. Profesie perfektiĝis tuj poste en Popola Ĉinio, dum jaro kaj duono.

Ŝatas teatron kaj muzikon, interesiĝas pri sociaj demandoj.



**Alexander Holevitch**
**(Bulgario, 24 junio 1947)**
Inĝeniero kaj inventisto. Vivas en Nederlando. Vidvo de sen. Nelly Holevitch, kiun li multe helpis ankaŭ por laboro subtene al afrikaj E-istoj. Patro de du filinoj.

E-isto ekde 1980. Forumano por E-Societo en Vraco.

Homo de paco kaj dialogo; konfesie ortodokso, tamen kleriĝema pri aliaj religioj, ankaŭ el fora oriento.



**Tihomir Lovrić**
**(Kroatio, 11 januaro 1972)**
Artisto, specife en la naŭa arto (komikso, karikaturo, bildliteraturo). Interalie desegnis la kamiŝibajon *Karmezina renkontis Lupon* de Giorgio Silfer kaj estas preparanta bildrakonton pri la Civito.

Diplomito pri la itala lingvo kaj literaturo en la Universitato de Zagrebo. Stabano ĉe KCE. Aktiva por la Esperanta Tempobanko kaj Civila Esperanta Servo.



**Georgi Mihalkov**
**(Bulgario, 21 majo 1952)**
Verkisto, konata ankaŭ kiel Julian Modest. Magistro pri beletristiko, fakiĝis esperantologie en la universitato de Sofio kaj tie lektoris pri Eo. Prezidinto de Bulgara E-Asocio. Vicprezidanto de la Esperanta PEN. Lingva Komitatano. Eliranta senatano.

Filo de E-isto, libere eklernis en 1973. Patro de du infanoj, el internacia geedzeco. Ortodokso.

## Civitana kongreso indas kaj endas



La Manifesto de Raŭmo indikis la kongresojn kiel vojon al kresko. Kaj la Blankanoj pledas por la starigo de granda, espereble ĉiujara kongreso de la Civito, kie la popolo renkontiĝu, kunsentu sian komunan destinon, renkontu siajn administrantojn.

Dum la finiĝanta mandato en nia konsorcio estis (re)lanĉitaj kvar valoraj renkontoj: KEF, DER, NAKSE, EKA, eĉ literatura krozado. Sed mankas la plej grava: kongreso kun diversaj eventoj ĉirkaŭ parlamenta sesio.

Ne estu turisma kongreso: por tio sufiĉas la Universala. Kaj estu respekto por la religiaj sentoj de la kongresanoj. La Blanka Listo specife subtenas ion en Afriko.

## 8$^{a}$ de Marto jes, 17$^{a}$ de Majo ne

La 17$^{an}$ de majo 1990 la Monda Asembleo por Sano forstrekis samseksamon el la listo de la psikologiaj malsanoj. Ekde tiu momento komenciĝis ofensivo por la agnosko de la egaleco inter paroj de sama kaj malsamaj seksoj kaj la justa batalo por seksa rajtegaleco riskas misevolui.

Ni restas fidele ankritaj al la artikolo 16 de la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj:

*1) Plenaĝaj viroj kaj virinoj, sen ia ajn limigo pro raso, nacieco aŭ religio, rajtas GEedziĝi kaj fondi familion.*

Samtempe ni ne konsentas pri la celoj de GLAT-kampanjo kaj ni bedaŭrus, se ĝia ekstremismo penetrus la esperantan kulturon. Interalie, tio malfaciligus la disvastigon de Eo en Afriko, kie samseksamo estas krimo laŭ la leĝoj de pluraj ŝtatoj.

La Blankanoj neniom intencas diskriminacii homon laŭ seksa orientiĝo. Tamen ili ankaŭ ne ŝatas ke gejoj formu fortajn lobiojn.

## Ek al *panachage*

Antaŭ sep jaroj, danke al la konstrua opozicio de la Blanka grupo, estis amendita la artikolo 17$^{a}$ de la Konstitucio, laŭ kiu la gajninta listo ricevas balotpremion en la Senato.

Ekde 2019 la gajninta listo ne havas premion de ses seĝoj, sed nur du, nome la du ĉefkandidatoj. La ceteraj dek sep seĝoj estas atribuitaj laŭ plena proporcieco, apud la plena pariteco de la asembleo de la paktintoj, la Forumo.

La Blankanoj venkis longan batalon, kiu en 2008 kondukis al la unua historia amendo de la Ĉarto de Sabloneto.

Krome, asignante prioritaton al la homoj kompare al la partioj, la Blanka grupo subtenis la amendon favore al senatano kiu ricevis plej multe da voĉoj en la elektoj, kaze de forpaso aŭ demisio de la unua Vickonsulo: ni akceptas nur iun el la popolo, ne el la kompromiso ene de la partio.

Mankas ankoraŭ tria venko: bonvolu doni al ni vian voĉon, se vi konsentas ankaŭ pri la enkonduko de *panachage*, nome la rajto voĉdoni ankaŭ por kandidato(j) en alia listo ol la preferata. Homoj, antaŭ ol partioj!

**La Blankanoj pledas por pli da investoj en Afriko, precipe en Burundio, Kongolando kaj Togolando.**

**Investoj, ne donacoj: plena apogo al E-Domoj, al kongresoj kiel EKA, al la mikrokredito, al la redukto de ŝuldoj, al stabaj postenoj.**

## Por pac-kulturo

Aprobindaj, sed ne sufiĉaj estas la streboj de la Verda majoritato favore al E-kulturo kiu estu kulturo de paco.

La Blankanoj aplaŭdas la fondon de Civila Esperanta Servo. Sed kiam startos la unua projekto? Kaj kie? Ni celas civilservan subtenon en areoj de efektiva postmilita bezono, precipe en Afriko.

En tiu kunteksto, kia estas la strategio rilate al azilpetantoj? Ĉu la sveda, kun transformo de E-Domo al io, kio funkcius nek kiel rifuĝejo nek kiel esperantujo?

Necesas premi al konkretaj iniciatoj en la NROj kie niaj paktintoj situas: ekz. en la Pac-Komitato de PEN Internacia, aŭ en la Naturamika Internacio.

La Blanka Listo volas pli da kuraĝo por kulturo de paco.

## La familio restu prioritata

La Blanka Listo opinias ke la familio estas la baza ĉelo de la socio, inkluzive de la esperanta.

Konsekvence, ni ne akceptas la promocion de samseksaj paroj ĝis la nivelo de ordinara familio.

Kaj ni ne subtenas poligamion, kvankam ni konscias ke (male al samseksa partnereco) ĝi ne kontraŭas al la litero de la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj.



La monogamia familio restas en la fokuso de niaj interesoj. Tial la Blankanoj proponas strategion de subteno al la familio.

En tiu strategio, parto estas atingebla per normoj. Ekzemple, necesas grandigi ĉe la familianoj, kaj precipe por la sengajnaj gefiloj, la servojn kaj avantaĝojn de la Mutuala Rabata Sistemo (pensu nur pri la kotizoj por la lingvotestoj!) kaj de Pro Esperanto.

En niaj aranĝoj ni devas eviti la sangosuĉan kotizan sistemon de la Universalaj Kongresoj!

Sed kiam necesas defendi la rajton de la E-patrinoj kaj vivi sian virinecon kaj disvolvi sian profesiecon, pli ol normoj utilos la konsciigo de la E-patroj. Ni ja kredas en feminismo engaĝita por ekvilibra gepatreco, kiu plifortigu la rolon de la familio.

Necesas multigi servojn ĝuste por la E-familioj: apogi la jam ekzistantan Renkontiĝon de E-Familioj, proponi edukan materialon por infanoj kaj adoleskantoj, relanĉi dokumentan produkton, kia estis *Gepatra Bulteno* antaŭ multaj jaroj.

Laŭ la Blanka Listo, la Civito devas fronti pli serioze ol nun la specifan temaron de la denaskuloj, de la enhejma instruado, de la aranĝoj por la E-familioj. Kaj okupiĝi pri tio sen varba celo, sed en spirito de eksperimentado kaj de servo al la popolo.

Popolo kiu ne prioritatigas la rajtojn kaj bezonojn de la familio estas popolo kiu ne povas evolui pozitive.

## Relanĉi zamenhofologion, kial?

Kvankam ne mankas la konscio, kompare kun la dua parlamenta mandato la Kapitulo en la postaj ne faris sufiĉe por flegi la memoron pri niaj majstroj, unuavice Lazaro Ludoviko Zamenhof.

La esperanta kulturo havas filozofian radikon en la zamenhofa homaranismo. Tiu radiko estas grava por la evoluo de la Civito. Tial ni strebas subteni la esplorojn pri la homaranismo de Zamenhof kaj igi tion deviga studobjekto en la lingvotesta sistemo, ankaŭ reference al komparado pri religioj. En tio necesas emfazi la esence etikan metodon de la homaranismo, pruvitan per la uzo de la esprimo "mi devas" en ĉiuj homaranismaj deklaracioj, kun kvaropa enhavo: ora regulo, obeo al la konscienco, uzo de internacia lingvo kaj uzo de neŭtralaj landnomoj.


Krome, la Blankanoj proponas organizi censadon kaj flegadon de ĉiuj ZEOj, reference al ĉiuj majstroj de nia kulturo.

Relanĉi zamenhofologion signifas rifuzi la taktikojn kaj de Hamas bazitan sur pogromoj kaj de cionismo tro danĝeran por civiluloj. Zamenhof indikis pli taŭgan solvon por la hebrea demando.



**François-Mauriack Nunda**
**(Kongolando, 27 januaro 2001)**
Naskite en suda Kivuo el luba etno, studentas pri ekonomiko en la universitato de Bujumburo, kun intereso ankaŭ pri lingvoj.

Eon li eklernis en 2021. Poste li trejniĝis pri instruado, pri redaktado, pri civita eduko, okaze de Afrikaj Esperantologiaj Semajnoj. Kunlaboris ĉe la redakcio de *Heroldo de Esperanto* dum kelka tempo, fakte ĝis (sed neniom pri) la jusa Universala Kongreso




**Honoré Sebuhoro**
**(Kongolando, 3 marto 1974)**
Vidvo kaj patro de tri infanoj. Eklernis Eon en 2004, diplomiĝis plurfoje kaj partoprenis en du AfrES kaj Afrikaj E-Kongresoj.

Vivas en la Kivu-regiono, kie li aktivas en societo pri sanasekura mutualo, bredado kaj agrikulturo, mikrokredito, edukado kaj disvolviĝo, lukto kontraŭ VIH / aidoso kaj seksa perforto. Li esperas aŭdigi en la Senato la voĉon de la plej profunda Afriko.



**Péter Szilvássy**
**(Hungario, 2 januaro 1974)**
Instruisto laŭ formado, multe agadas en organizoj sen profita celo, precipe en la kristana medio. Volonte helpas al malsanuloj, laŭ mizerikorda faro.

Loĝas en Budapeŝto, kie li plu studas. Eklernis Eon en 2015, staĝante ĉe KCE, kaj entuziasmiĝis pri la lingvo kaj la Civita ideo. Lia kandidateco atestas ĝuste tiun entuziasmon, kvankam li malmulte aktivas.



**Aléxandrine Tshamena Omba**
**(Kongolando, 25 februaro 1975)**
En Kinŝaso instruisto pri katekismo. Instruis Eon en lernejo "Anna Paolizzi", tiel longe kiel la proprietulo respektis la celojn de la karmemora pastro Magnani. Patrino de junulino.

Fondis E-istan Grupon de S. Rita kaj Esperantan Virinaron Kongolandan. Iniciatis la unuan E-teatran trupon en Afriko kaj mem verkis. Aktiva ankaŭ en la landa E-asocio.



**Kalle Vilbaste**
**(Estonio, 12 aprilo 1967)**
Preferas sian baptotagon: 24 aŭg 1990. Sakristiano ĉe la Sankta Spirito, la plej bela preĝejo en Talino. Edzo, patro de tri infanoj, el kiuj unu E-iĝis.

20-jaraĝa li eklernis Eon kaj tuj aktivis en loka tavolo. Du bakalaŭraj diplomoj (matematiko, teologio). Interesiĝas pri historio de matematiko, sed altiras lin precipe la kantado de psalmoj (en estona, latina, Eo).

***Pli kaj pli multiĝas la kunsidoj de Asembleoj en hibrida aŭ rekte virtuala formo. Tio okazas ekz. por TEJO. Ĉu la Parlamentaj sesioj de la Esperanta Civito povus okazi ankaŭ virtuale?***

**Lucien Kagina, forumano**

***Ne, ĉar TEJO kaj aliaj movadoj estas nur INROj, dum la Esperanta Civito estas strukturita kiel subjekto de internacia juro. Neniu subjekto de internacia juro kunsidas virtuale: nek la Ĝenerala Asembleo de UN, nek la Parlamento de Eŭropa Unio, nek la parlamentoj de la ducento da ŝtatoj en la mondo, nek la Ĝenerala Kapitulo de la Suverena Ordeno de la Maltaj Kavaliroj, nek la vatikana konklavo por la Sankta Seĝo kunsidas virtuale.***

***Por la Senato, gravas la kohereco de la grupoj: Blanka senatano el Afriko povas ĉiam kalkuli je la Blanka grupestro, por defendi la interesojn de sia regiono. Kompreneble se en la koncerna areo tro malmultaj voĉdonas, ili ne elektas sian kandidaton kaj ne aŭdigos sian voĉon en la Senato, sendepende de la distanco.***

**la Vickonsulo**